
N° 04 1971

G.L. GIMELLI

# ITALA fervojisto

Organo
Associazione
Italiana
Ferrovieri
Esperantisti





IFEA

## BONDEZIROJ

OKAZE DE LA VENONTAJ FESTOJ, LA ESTRARO DE ITALA FERVOJISTA ESPERANTO-ASOCIO "I.F.E.A." KAJ LA REDAKCIO DE "ITALA FERVOJISTO", VARME BONDEZIRAS FELIĈAN KRISTNASKON KAJ PROSPERAN NOVJARON AL ĈIUJ MEMBROJ KAJ SIMPATIANTOJ DE NIA ASOCIO, KORAJN BONDEZIROJN ANKAŬ AL ESTRARO DE LA INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-FEDERACIO "I.F.E.F." KAJ AL LA TUTA ANARO KAJ LEGANTARO EN ĈIUJ LANDOJ.

---------ooo0ooo---------

## 4-a TRILANDA RENKONTIĜO EN LJUBLJANA

La 4-a Trilanda Renkontiĝo kiu okazis en Ljubljana de la 1-a ĝis la 3-a de oktobro 1971-a devus esti laŭ la titolo, trilanda (nome renkontiĝo de esperantistoj de Italio, Aŭstrio kaj Jugoslavio), sed efektive fariĝis kvarlanda danke al la partopreno de Hungara delegacio. Pli ol 100 gesamideanoj el 4 landoj, inter kiuj 15 italoj, partoprenis la renkontiĝon.

Post la malfermo de la ekspozicio de esperantaj libroj kaj infandesegnoj, kaj la amika interkona vespero, kiuj okazis vendrede la 1-an de oktobro, sabate matene, en la mirinda asemblea salono de la urbodomo, okazis la solena kunsido por festi la 25-jaran (arĝentan) jubileon de Slovenia Esperanto-Ligo kaj la 50-jaran (oran) jubileon de Esperanto Societo Ljubljana. Prezidis S-ano Logar; portis la salutojn de la respektivaj organizaĵoj la delegitoj de la diversaj landoj kaj de la diversaj Ligoj de Jugoslavio. Simpatia la interveno de nia kolego Tarlindano el Venezia kiu donacis al Slovenia E-Ligo kaj E-Societo Ljubljana du reproduktaĵojn de la Venezia gondolo kun la gratuloj por iliaj jubileoj. Festparoladis, pri la historio de Esperanto-movado en Slovenio, D-ro Peter Zlatnar, Prezidanto de Slovenia E-Ligo. Dekjara novbakita memlernanto (Enriko) salutis la gepartoprenantojn en la nomo de la novaj fortoj de nia movado. Post tiu kunsido okazis vizito de la urbo, de la kastelo kaj de la Esperanto-ekspozicio.

Posttagmeze en la sama salono de la urbodomo, sub la prezido de S-ano Dürrshmid el Klagenfurt, kiu invitis la 5-an Trilandan Renkontiĝon en sia urbo venontjare, komenciĝis la laboroj de la konferenco kiu elektis la temon por la estonta agado: "Rolo de internacia lingvo en dulingva ĉelimaj regionoj", proponita de D-ro Zlatnar.

Vespere en la grandioza salonego de la Nacia Galerio ni ĉeestis la solenan kulturan aranĝon. Tiu mirinda prezentado meritas apartan mencion kaj laŭdon, ĉar la vira kanthoro nomata "Slovenia okteto" kantis por ni majstre kaj longe (inter alie ankaŭ italan kanton "La Montanara" kaj esperantan kanton). La oper-katisto Ladko Korošec, akompanata de Milena Trost, kantis plurajn ariojn de operoj kaj popolajn kantojn. Nia kara amikino S-ino Draga Mahoriĉ recitis la poemon "Feliĉon". S-ro Stane Logar legis plurajn poemojn. Prezentis la tutan vesperon samideano Janez Zadravec el Maribor. Antaŭ la prezentado, ni vizitis la salonojn de la Nacia Galerio kun ĝiaj belegaj artaĵoj.

Ĉar la antaŭplanita tuttaga ekskurso en suda Slovenio, ne povis okazi pro la soldataj manovroj, S-ano Logar kaj siaj helpantoj, elektis lastmomente tute alian ekskurson. Sed la elekto estis vere feliĉa: la vizito al la imponaj monumentoj de la Romana nekropolo en Šempeter, 10 km. de Celje (la Romana Celeia), la vizito de la pasejo Troiane (tie ni gustumis la famajn karnavalajn kukojn), la trajro de la valo de la rivero Savinja ĝis la Planinski Dom en Logarska Dolina kie ni tagmanĝis, estis vere tre interesaj. Post la tagmanĝo ni lasis la du aŭtobusojn kaj piede atingis la 74 metran altan akvofalon "Slap Rinska" tra mirindaj arbaroj kies koloroj agrable impresis niajn okulojn. Sur la revenvojo la unuaj ombroj de la fruvespero kaptis nin dum la vizito de la modernega urbo Velenje, konstruita laŭ la plej modernaj konceptoj de urbanizado, kun ĝiaj pitoreskaj parkoj, sportejoj kaj naĝejoj.

Reveninte al Ljubljana je la oka, post la lastaj adiaŭoj kaj dankoj al la organizantoj, danke al amiko Viotti kaj lia rapidega aŭtomobilo, ni atingis Trieste kaj vagonare Bologna.

G.G.

42-a NACIA KONGRESO DE ESPERANTO (de 18-a ĝis 24-a de septembro 1971-a)

Solena inaŭguro

La 19-an de septembro 1971-a, en la salono de Kinejo Manzoni, en Marina di Grosseto, okazis la solena inaŭguro de la 42-a Itala Kongreso de Esperanto. Ĉeestis 350 naciaj delegitoj, kaj 8 eksterlandaj reprezentantoj kiuj portis la saluton de siaj Esperanto-Asocioj: Aŭstrio, Argentino, Francujo, Germanujo, Japanujo, Nederlando, Pollando kaj Usono.

Inter la ĉeestantaj aŭtoritatoj oni rimarkis: Prof-ro Caccavelli, centra Inspektoro de Ministerio pri Instruado; Senatano Torquato Fusi; S-ro Giovanni Finetti, urbestro de Grosseto; On.Mario Tognoni; skabeno Renato Pollini; la reprezentantoj de Provincestro, de Kvestoro kaj aliaj.

Malfermis la Kongreson D-ro Stoppoloni, Prezidanto de F.E.I., kiu salutis kaj dankis la reprezentantojn de la Itala Registaro, de la Provinco, de la urba administracio kaj la Provincan studestron de Grosseto.

Prelegis, por klarigi nian ĉefan problemon pri la instruo de Esperanto, inĝeniero Azzi el Como kaj Prof-ro Dazzini el Massa; tuj poste, Cav.Minnaja legis mirindan poezion dediĉatan al Grosseto kaj al Regiono Maremma.

Tiu ĉi la temo de la oficiala prelego de inĝ.Azzi: Esperanto, ponto inter la popoloj kaj solvo pri la lingvo-problemo en Eŭropo. "La lingvobatalo (li diris) jam fariĝis evidenta en Eŭropo kaj baldaŭ eksplodos la problemo pri Lingvo Internacia. Monolingvismo ne estas ebla sen doni privilegion al unu nura lando sur la aliaj; pro tio la esperantistoj proponas la uzadon de Esperanto, kiu estas internacia lingvo, neŭtrala kaj facila por ĉiuj. Ni estas pretaj labori por diskonigi Esperanton en la mondon".

Labora kaj amuza programo

Densa laborprogramo karakterizis aparte tiun ĉi 42-an kongreson; dimanĉon kaj lundon, sinsekvis unu post la alia, la kunvenoj de FEI, por la diskuto kaj aprobo de la bilanco 1970-a, por elekto de nova estraro kaj por la perspektivaj programoj 1972-a. La sekvantajn tagojn okazis la jarkunvenoj de fakaj asocioj: instruistoj, fervojistoj, katolikoj, muzikistoj kaj reprezentantoj de I.K.K.; plie oni aldonis la prezentadon kaj la konsistigon de la lernogrupoj. Specialan novaĵon alportis prof-ro Dazzini, pri la propono de "Lunigiana Instituto" kiu disponigis salonon por la Nacia Biblioteko de Esperanto en "Castello Malaspina" en Massa.

La ekskursa programo konsistis el vizito al plej allogaj kaj tipaj lokoj de la provinco. Do, ĵaŭdon: tuttaga ekskurso al Massa Marittima, kie la kongresanoj ĝuis la prezentadon de flag-svingado, fare de la "Società dei Terzieri" en mezepokaj kostumoj; vendredon: libervola vizito ĝis la "Zona Albarese" (inter Ombrone kaj Argentario) kies tipaj pejzaĝoj, floraro kaj faŭno ankoraŭ prezentas la mareman karakterizon.

Amuzaj kaj kulturaj vesperoj

Ĉiun vesperon de la semajno la kongresanoj ĝuis varian amuzan aŭ kulturan programon. Sabate: Interkona vespero; Dimanĉe: Dancfesto kun kantoj en Esperanto; Lunde: Premiado de literatura konkurso, kaj deklamado de la premiitaj laboroj; Marde: Je la 18-a horo, en Grosseto: Prelego-debato pri la temo: "QUALE LINGUA PER L'EUROPA" (kiu lingvo por Eŭropo); enkondukis la debaton Prof-roj E.Migliorini de la Roma Universitato kaj A.Bausani de la lingva fakultato de la Napola Universitato. Vespere alia dancfesto, por la gejunuloj, ĉe Sveda Vilaĝo "Riva del Sole". Merkrede: Literatura kaj koncerta vespero; partoprenis la ĥoro "Giacomo Puccini". Ĵaŭde: Tuttaga ekskurso. Vendrede: Fermo de la Kongreso kaj duontaga ekskurso.

"I.F.E.A." (Itala Fervojista Esperanto-Asocio) kaj la Grupo "A.Tellini" el Bologna sendis gratulleterojn kaj dankojn al L.K.K. de Grosseto por la streĉa laboro kaj la sukceso de la Kongreso.

GIUSEPPINA GAMBERINI

## INTERNACIA LITERATURA KONKURSO "GROSSETO"

Okaze de la 42-a Itala Nacia Kongreso de Esperanto, la L.K.K. kun la helpo de la lerta Literatura Rondo "LA PATROLO", italaj junuloj kiu eldonas "LITERATURA FOIRO" (Redaktejo: Via Pantano, 17 = I-20122 Milano - Italio), organizis literaturan konkurson en la branĉoj originala poezio kaj originala prozo.

Pri la originala poezio gajnis la unuan premion "Se mi mortos" de la hungara Stefano Nemere, la duan premion "Mezaĝulo al la hodiaŭa junularo" de la fama brita Esperanto-poeto William Auld kaj la trian "Okuloj" de nia konata membro Gianluigi Gimelli el Bologna.

Tiu ĉi lasta estas la sola kiu ĉeestis la Kongreson kaj ricevis persone la medalon el la manoj de la Centra Inspektoro de Ministerio pri Instruado Prof-ro Caccavelli.

La aliajn premiojn, pri originala prozo gajnis: la unuan "La granda skandalo" de D-ino Lina Gabrielli el Ascoli Piceno, la duan "En la ombro de via rigardo" de Stefano Nemere kaj la trian "La trovitaj paĝoj" de Nevina Nedelĉeva el Bulgario.

Ĉiuj premiitaj konkursaĵoj estis majstre legataj, dum la premiado, de Prof-ino Clelia Conterno, D-ro Nicola Minnaja, S-roj Valerio Ari kaj Ermigi Rodari. La verkoj aperos en "L'Esperanto" kaj "Literatura Foiro".

Ni aperigas la poezion de Gianluigi Gimelli "Titti" kiu gajnis la trian premion en la branĉo Originala Poezio:

### O K U L O J

Maldika
malforta,
sen move, li kuŝas
kvazaŭ sen plu spirito,
vivanta nur en la okuloj.
Okuloj,
okuloj grandaj,
por peti kompaton:
por peti kompaton,
ne al la homoj,
kies leĝo
ĝin tute ne konas,
sed al Dio
kies sino konsolas
angoron la plej gravan.
Okuloj,
okuloj angoraj
plenplenaj
de tiom da horoj
de suferado;
plenplenaj
de tagoj kiujn senmove pasigis,
li ja tiel aktiva,
premita de longa,
malfortiganta turmento,
kiu malrapide mortigas
antaŭ tempe.
Okuloj,
okuloj rakontantaj
longajn batalojn
kun la malsano,
longajn batalojn
por vivi
por si mem
por la aliaj
ĝis la fino . . . .

Gianluigi Gimelli
"Titti" - Bologna

## ĜENERALA JARKUNVENO DE F.F.E.A. EN LYONO

Jam vendrede, la 22-an de oktobro, je nia alveno en Lyono ni spertis, denove, la gastamecon de la Francaj gekolegoj kaj speciale de la Lyon-anoj. Kolegoj Marty kaj Giovenal kune kun la karaj geedzoj Blondeaux atendis ĉe la stacidomo kaj gvidis nin al la Hotelo. Post komuna vespermanĝo, ni tra rigardis la belegan urbon kiu kuŝas inter du riveroj: Rhône kaj Saône.

Sabate matene alveno de aliaj gepartoprenantoj (multaj eksterlandanoj) kaj akcepto ĉe la sidejo de la fervojista grupo. Posttagmeze, dum la francaj kolegoj streĉe laboris, ni gastoj, vizitis la urbon kaj ĉirkaŭaĵojn akompanataj de Lyonaj geesperantistoj. Vespere ni vizitis la malnovan urbon kun ĝiaj karakterizaj palacoj, stratetoj kaj paŝejoj. Poste ni kunvenis ĉe la sidejo de "Syndicat d'Initiative" (Urba turisma oficejo) kie, kune kun la gustumado de vino Beaujolais, ni ĝuis la amuzan spektaklon (kantoj kaj dancoj) prezentitan de la urba ĥoro "Lyona Stelo" kaj de la francaj gejunuloj.

Post noktomeze ni enlitiĝis jom lacaj sed tre kontentaj pri la bela tago donita al ni de la francaj geamikoj.

Dimanĉon matene plena kunsido kun elekto de la nova estraro de F.F.E.A. Ĝi nun konsistas el jenaj membroj: S-ino Hélène MOUSSET, S-roj Robert AUDUREAU, Joseph CHUITON, Robert COYAC, Gilbert GERARD, Jean-Claude MARTIN, Jean OTT, Louis PANNIER, Pierre ROBIOLLE kaj Maurice ROCHERY.

Luksa bankedo fermis la belan manifestacion. Ni korege dankas kaj gratulas la kolegojn Giovenal, Laheurte, Marty kaj ĉiujn kiuj helpis por okazigi tiajn belegajn neforgeseblajn tagojn.

Germano Gimelli

## INFORMOJN EL POLLANDO

Esperantlingva prospekto pri Miedzygòrze: Aperis esperantlingva prospekto pri Miedzygòrze, ripozloko en kiu ĉiujare okazas aùtunaj Esperantistaj feriadoj. Ĝi estas ricevebla senpage ĉe la eldoninto: Centro de Turisma Informado pri Malsupra Silezio, WROCŁAW, str. Kollataja, 31 (Pollando).

Pli ol 5 mil diskoj de "Muzilo" jam venditaj! - En daùro de 6 monatoj oni vendis pli ol kvin mil diskojn "Bonveno" kun kvar kanzonoj en plenumo de la Esperantista Muzik-Ensemblo "Muzilo" el Vroclavo. La disko estas ankoraù aĉetebla senpere ĉe: "Ars Polona", VARSOVIO, str. Mrakawskie Przedmreŝcie, 7 - Pollando -. Prezo unu usona dolaro.

Interaltlerneja Scienca Rondo de Esperantistoj en Vroclavo: La 23-an de aprilo 1971-a fondiĝis en Vroclavo Interaltlerneja Scienca Rondo de Esperantistoj, kies celo estas popularigado de Esperanto inter studentoj kaj Sciencistoj de Vroclavo kaj sciencaj kontaktoj pere de Esperanto inter altlernejoj de diversaj landoj. Rondo havas 23 membrojn kaj serĉas kontaktojn kun ĉiuj altlernejaj Esperanto-grupoj en la mondo. Adreso: Interaltlerneja Scienca Rondo de Esperantistoj, WROCŁAW-17, Poŝtkesto 16 (Pollando).

Korespondanonceto: Se iu deziras ekligi korespondadon kun membroj de la Esperantista Klubo en Vroclavo - urbo proponita por la Universala Kongreso en 1974 - skribu al: Vroclava Esperanto-Klubo, WROCŁAW-17, Poŝtkesto 16.

LA DISTRIKTA LABORRONDO DE LA ESPERANTOAMIKOJ en la Germana Kulturligo 701 LEIPZIG, Käthe-Kollwitz-Strasse 115 sciigas al ni jene: "Esperantista renkontiĝo dum Foiro en Leipzigo (Germana Demokrata Respubliko) okazos 11-3-1972 en Klubo de la Inteligentularo "Gottfried-Wilhelm-Leibnitz" 701 LEIPZIG, Elsterstr. 35 je la 19,30-a horo. Vizitu la Esperantistoj en Leipzigo!". La Distrikt-Estro: Walter Dietze, 7105 GROSSPÖSNA, Salbergstrasse 21 D.D.R.

## ESPERANTO EN RADIO

Pola Radio - Ĉu vi deziras gajni 10-tagan ekskurson tra Pollando? Partoprenu la novan konkurson de la Pola Radio "FORUMO - EÙROPO - 71"

La respondo al ambaù subaj demandoj ebligas lotum-gajni unu el la ĉefaj premioj - 10-tagan senpagan ekskurson tra Pollando:

1. Kiel vi rilatas al la propono de la socialismaj landoj kunvoki konferencon pri la afero de la eùropa sekureco kaj kunlaboro, kaj kion vi atendas de tiu ĉi konferenco?
2. Kiuj personoj en via lando kaj en kia maniero speciale meritiĝis por la afero de la paco?

Inter la partoprenontoj de la konkurso, krom la ĉefpremioj, estos lotumitaj multaj objektaj premioj kaj memordonacoj. La leterojn kun respondoj oni sendu al: Pola Radio, Esperanto-Redakcio, Varsovio -1, P.O.Box 46 Pollen kovertoj signitaj per la devizo: "Forumo", ĝis la 31-a de decembro 1971.

La rezultoj de la konkurso estos anoncitaj la 31-an de januaro 1972 de la Esperanto-elsendoj de la Pola Radio, kiuj estas aùdigataj ĉiutage je la 6,00 h.(ondlongoj - meza: 200 m., mallongaj: 41 m., 49 m.) kaj je la 6.30 h.(mallongaj ondlongoj: 31 m., 41 m.). Ambaù elsendo-horoj estas indikitaj laù la mezeùropa tempo.

Invitante al partopreno en la konkurso ni samtempe petas diskonigi ĝin vaste inter viaj konatuloj, samklubanoj, leter-amikoj. Ni firme kredas, ke

en la konkurso, kies temoj kongruas kun la pacaj idealoj de la Esperanto-movado, la esperantistoj partoprenos amase.

Bonŝancon en la lotado de la premioj! POLA RADIO

## INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-SKISEMAJNO

La Internacia Fervojista Esperanto-Skisemajno "I.F.E.S." okazos de 5. 12. II. 1972 en Fervojista Sportdomo "Willi Merkl-Heim" en Spitzingsee manujo). La lago Spitzing situas enmeze de montokaldrono, kies pintoj altiĝas ĝis 1800 m. Deko da liftoj ĉirkaŭas la lagon, sur kies neĝkovrita glaciejo kaj en kies pli vasta ĉirkaŭaĵo multe da skipistoj kaj promenad-eblecoj allogas nin, ĉiun laŭ liaj deziroj kaj emoj. Esperanton parolanta skiinstruisto ĉeestos la tutan semajnon. Partoprenontoj maksimume 60 personoj. Prezo por la tuta restado (kompleta pensiono sen trinkaĵoj), speciala aŭtobuso kaj diversaj aranĝoj estos 160 GM. Antaŭpagenda 50 GM. samtempe kun forsendo de la aliĝilo. Ĉi tiu sumo ne estos repagebla kaze de ne partopreno. Bonvolu sendi la aliĝilon plej malfrûe ĝis 15.12.1971 al: S-ino Elfriede KRUSE, D-6 FRANKFURT/Main, Schweizer Str.104, kaj samtempe la antaŭpagon al la kasisto: S-ro Kurt JENTSCH, D-6105 OBER-RAMSTADT, Bahnhofstr.31/b.

La sportloko Spitzingsee (ŝpicingse) situas en la Bavaraj Alpoj, proksime de la fervojlinio München-Bayrischzell. Destinstacio estas FISCHHAUSEN NEUHAUS. De tie nin veturigos speciala aŭtobuso 6 km. al nia hejmo en alteco de 1100 m. En la domo troviĝas ĉambroj je 2, 3 kaj 4 litaj kun flua akvo kaj centra hejtado. Krome estas duŝoj je dispono.

## 24° CONGRESSO INTERNAZIONALE DEI FERROVIERI ESPERANTISTI

I. F. E. F.

LUGANO (Svizzera) dal 6 al 12 maggio 1971.

PROGRAMMA PROVVISORIO

| | |
|---|---|
| Sabato, 6-5: | Ricevimento dei Congressisti. Serata della conoscenza. |
| Domenica, 7-5: | Servizio Religioso. Solenne apertura del Congresso. Pranzo in comune. Gita sul lago di Lugano. Concerto. |
| Lunedì, 8-5: | Riunione di lavoro del Comitato internazionale dell'IFEF. Riunione delle Commissioni. Ballo internazionale. |
| Martedì, 9-5: | Riunione di lavoro del Comitato internazionale dell'IFEF. Gita al Monte Generoso. |
| Mercoledì, 10-5: | Visita della stazione merci a Chiasso o visita dell'Officina Centrale di Bellinzona. (scegliere o l'una o l'altra). Partita di calcio e altre manifestazioni giovanili. Serata ricreativa giovanile. |
| Giovedì, 11-5: | Assemblea Generale dell'IFEF. Presentazione di diversi film Conferenza su tema ferroviario. Serata folcloristica. |
| Venerdì, 12-5: | Gita di tutto il giorno a Lucerna con visita al Museo del Traffico. Viaggio in battello sul lago, da Flüelen a Lucerna Chiusura del Congresso a Lucerna. |

Quote di adesione: fino al 31-1-1972: soci dell'IFEF Fr.40 non soci Fr.50
dal 1°-2-1972: " " " " 50 " " " 65

Familiari, pensionati e giovani in età meno di 20 anni, pagano la metà.

COMITATO ORGANIZZATORE

| | |
|---|---|
| - Presidente: | Edo TOGNINI, Capo Ufficio, Bellinzona |
| - Vice-Presidente: | Fernando DE FAVERI, Capo-Tecnico, Bellinzona |
| - Segretario: | Kurt GREUTERT, Macchinista, Giubiasco |
| - Cassieri: | Ernest GLÄTTLI, Sottocapo, Brugg<br>Hans NOLL, Ex Sottocapo, Wallisellen |
| - Collaboratori: | Otto WALDER, Macchinista, Romanshorn<br>Giovanni SASSELLI, Ex Macchinista, Arbedo-Bellinzona. |

SOSTENETE LA NOSTRA ASSOCIAZIONE! ADERITE ALL'I.F.E.A.!

VERSATE IMMEDIATAMENTE LE QUOTE PER IL 1972!

Per agevolare il versamento delle quote sociali si allega il bollettino di versamento nel C.C. Postale n° 8/24094 intestato all'I.F.E.A. - Bologna.

## COMUNICATO DEL CASSIERE

Le quote sociali per l'anno 1972 sono rimaste le seguenti:

- Associazione all'I.F.E.A., all'I.F.E.F., alla F.E.I. ed all'U.E.A. con abbonamento alla rivista mensile "L'Esperanto-FEI": £. 3.500,- annue.
- Associazione solamente all'IFEA ed all'IFEF ( per quei Soci che pagano le quote di associazione alla FEI ed all'UEA direttamente o tramite i Gruppi Esperantisti locali): £. 1.000,- annue. Quest'ultima quota rimane invariata nonostante l'aumento delle quote dell'IFEF deliberato dal Comitato Internazionale dell'I.F.E.F. durante il Congresso di Rimini.

Si pregano vivamente i Soci che non hanno ancora pagato le quote sociali per il 1971 e continuano a ricevere il bollettino, di trasmettere con ogni URGENZA le quote 1971 da noi già versate alle Associazioni di cui siamo aderenti, oppure trasmettere le loro dimissioni per non pagare, anche per l'anno 1972, le loro quote alle suddette Associazioni.

## ESPERANTO KAJ FILATELO

Dimanĉon la 3-an de oktobro 1971 en SASSO MARCONI, urbeto apud Bologna, okazis la unua filatelista kunveno kun granda ekspozicio de poŝtmarkoj. Multnombraj estis filatelistoj kiuj partoprenis la p.n.-ekspozicion pri diversaj temoj: Bologna esperantisto gajnis grandan pokalon kaj diplomon per ekspozicio de Esperantaj poŝtmarkoj. Estis ankaŭ elmontrita, sur granda tablo, ampleksa kolekto de poŝtstampoj de diversaj Esperanto-kongresoj, sed la ĉefa celo de la Bologna-j esperantistoj estis propagandi Esperanton.

Ankaŭ nia sekretario ricevis "Osella"n(bronzan artan medalon), kaj diplomon, je la 8-a Nacia Fervojista Filatela ekspozicio en Venezio, ĉar li ekspoziciis sian kolekto de Esperantaj poŝtmarkoj kaj poŝtstampoj inter kiuj, tiuj de ĉiuj I.F.E.F.-Kongresoj. La grandan bronza medalo estas donaco, al la Fervojista Ekspozicio, de la Komunumo de Venecio.

Tranĉu ĉi tie kaj resendu tuj al la Sekretariejo

---

## I M P O R T A N T E

Si pregano tutti i nostri Soci di riempire il seguente modulo ed inviarlo alla segreteria dell'I.F.E.A., (Via Donato Creti, 61 40128 Bologna) al più presto; comunque non oltre il 31 dicembre 1971.

MODULO INCHIESTA SOCI DELL'I.F.E.A. (per uso statistico)

Il sottoscritto dichiara di essere attualmente:

| | | | |
|---|---|---|---|
| Ferroviere in servizio presso: | Ferrovie dello Stato. . . . . . | Si | No |
| | Ferrovie in Concessione. . . . . | Si | No |
| Ferroviere in pensione delle: | Ferrovie dello Stato. . . . . . | Si | No |
| | Ferrovie in Concessione. . . . . | Si | No |
| In Servizio presso organizzazioni affini: | Motorizzazione . . . . . . . . . . | Si | No |
| | Appalti . . . . . . . . . . . . | Si | No |
| | Altre categorie . . . . . . . . . | Si | No |

In pensione come ex dipendenti di organizzazioni e categorie aff. Si No

Ha prestato servizio in passato presso le ferrovie o in organizzazioni o categorie affini senza raggiungere il diritto alla pensione Si No

Familiari di ferroviere: Moglie . . . Si No Figlio . . Si No
Altre categorie . . . . . . . . . Si No

Semplice simpatizzante . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . . Si No

Il sottoscritto dipende dal Compartimento di. . . . . . . . . . . . .
Servizio . . . . . . . . . . . . . . . .
e fa parte del personale . . . . . . . . . .